

BRAZILA KRONIKO



INFORMILO
DE
BRAZILA
ESPERANTO
-LIGO

Jaro 1^a



Julio - Aŭgusto / 1978



nº 1

Unua Latin-Amerika Esperanto -Kongreso



ENHAVO

Paroloj de la Ĉefredaktoro	2
Kunlaboro Interorganiza	2
Komputero Akcelos Nian Movadon	3
Scienco por Ĉiuj	3
Unua LAEK – Sukcesa Okazaĵo	5
Junulara Partopreno	6
Katolika Diservo	4
Teatro kaj Aŭdvidaj Komunikiloj	7
Ni Kantis en Marilja	8



LASTSHORE: EN LA UNIVERSALA KONGRESO DE
VARNA UEA AKCEPTIS BRAZILAN
ESPERANTO-LIGON. KIEL UNU EL
SIAJ LANDAJ ASOCIADI EN
BRAZILIO.

NASKIĜATESTO

Jam delonge, la legantoj de BRAZILA ESPERANTISTO al kutimiĝis trovi sur ĝiaj paĝoj la rubrikon BRAZILA KRONIKO.

Ĉiunumere, ĝi informis al la anaro pri la lastaj novaĵoj en la brazila E-movado. Sed, pro la neofta au, kelkfoje, neakurata apero de la revuo, la novaĵoj, ĝenerale, atingis la legantojn jam malaktualiĝintaj.

Pro tio, la estraro de BEL decidis apartigi la rubrikon de la revuo kaj eldoni ĝin kiel memstaran informan bultenon. Tiamaniere ni intencas solvi la problemon.

Ni profitas la okazon kaj petas al ĉiuj sendi al ni materialon (se eble, kun netaj fotoj), ĉar dependos precipe de vi, kara leganto, ke nia bulteno havu longan vivon.

Samideane

ALOISIO SARTORATO

BRAZILA KRONIKO (Crônica Brasileira)			
Dumonata informilo de Brazila Esperanto-Ligo <i>Boletim informativo bimensal da Liga Brasileira de Esperanto</i>			
	Adreso	Praça da República, 54 – 2º	
	Endereço	20.211 – Rio de Janeiro – RJ	
		tel.: 232-6309	
Ĉefredaktoro <i>Redator-chefe</i>	Aloisio Sartorato	Presaraĝo <i>Diagramação e Arte</i>	Alan Romero
Kunredaktoroj <i>Redatores</i>	Sylla Chaves Alan Romero	Kompostado <i>Composição</i>	Compósita
Finredaktado <i>Redação final</i>	16/08/78		

Kunlaboro interorganiza



Almada

Chaves

Cosenza

Okaze de la Unua LAEK, 17-22/VII/78, Marilja estis tre taŭga renkontejo por la estraroj de la tri brazilaj naciaj Esperanto-organizoj. En ilia kunsido ĉeestis ankaŭ ges-roj Grattapaglia, kiel reprezentantoj de UEA. S-ino Ursula Grattapaglia poste kunportis al la renkontiĝo de la komitatanoj de UEA la jenan kunskribitan leteron:

"En la 20^a de julio 1978. Sinjoroj Komitatanoj: Ni konsideras, ke niaj du organizoj povos kune esti perantoj de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO en la jaro 1979. Ni vidas neniun problemon en la kunlaboro inter ni. Subskriboj: SYLLA CHAVES, Prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo; BRAZ COSENZA, Prezidanto de Kultura Kooperativo de Esperantistoj. Aldono: Mi konsideras la ĉi-supran deklaron ankaŭ kontentiga por nia organizo. Subskribo: F.S. ALMADA, Prezidanto de Brazila Konsilantaro de Esperanto."

Komputero akcelos nian movadon

La prezidanto de B.E.L. faris prelegon pri "Informatiko, amaskomunikado kaj Esperanto". Liaj vortoj pri amaskomunikado aperas en la artikolo "Teatro kaj aŭdvidaj komunikiloj". Parolante pri informatiko, li indikis la bezonojn de la Latin-Amerika Esperanto Movado kaj la ĵus-komencitan laboron de B.E.L.

Por la efiko de niaj organizoj kaj de nia komunikado ni bezonas antaŭ ĉio esti bone informitaj. B.E.L. iom-post-iom komputerigos tri tipojn de informoj: (1) pri personoj — esperantistoj kaj gravaj simpatiantoj; (2) pri libroj kaj dokumentoj en niaj libroservoj kaj bibliotekoj; (3) pri eventoj en la movado (ekz: leĝproponoj, universitataj kursoj, kongresoj, ktp.). Pri tiuj tri informkampoj estos sinsekve preparitaj demandaroj, sliparoj, komputeraĵoj kaj komputeraĵaj analizoj.

Demandaro n^o 1 estis prezentita al la kongresanoj en Marilja kaj estas kunsendata kun tiu ĉi revuo. Ju pli rapide vi resendos ĝin des pli efike ni atingos la disigitajn esperantistojn kaj amikojn de Esperanto por la sukceso de la 66^a UEA-Kongreso en Brazilja.

Scienco por ĉiuj

Disigitaj tra la tuta programo estis kelkaj prelegoj, kiujn oni povus prave titoligi POPOLA UNIVERSITATO: altnivelaj, utilaj kaj tute klaraj danke al la kapablo de la prelegantoj kaj ankaŭ al la bone konataj kvalitoj de nia internacia lingvo.


Mankis la ĉeestoj de Curt Milkuschutz (kies prelego pri la jaro 2.000 estis tamen legata al la ĉeestantaro fare de Miguel Angel Ruffinengo) kaj Roberto Passos Nogueira. Ni tamen bone gustumis prelegojn pri lingvistiko (Geraldo Mattos kaj Felix Garcia Blázquez), pri miskuracado pere de antibiotikoj (Paulo Sergio Vianna), pri la evoluo de la prahomo al la kibernetika homo (Pastro José Nogueira Machado) kaj pri kibernetika pedagogio (Oswaldo Sangiorgi). Eĉ sciencaj eksperimentoj pri la ĉefaj kvalitoj de akvo estis prezentitaj surpodie fare de inĝeniero Alberto Barrocas. Kaj inĝeniero Alberto Flores montris

lumbildojn pri ŝtalfabrikado oficiale preparitajn de la fama brazila entrepreno COMPANHIA SIDERÚRGICA NACIONAL, kiu ankaŭ eldonis specialan informlibreton en Esperanto.

D-ro Paulo Sergio klare montris la danĝerojn de senkuracista uzado de antibiotikoj, ekzemple kiam temas pri virusaj malsanoj (kontraŭ kiuj antibiotikoj ne estas taŭga kuracilo) aŭ kiam la uzata dozo ne estas sufiĉa por ekstermi la mikrobojn kaj anstataŭe helpas la naskiĝon de pli rezistaj mikroboj kontraŭ kiuj, finfine, antibiotikoj fariĝos tute senefikaj.

Pastro Machado montris la homan evoluon ek de la prahomo — saĝa kaj il-fara — kiu

D-ro Barrocas prezentas eksperimentojn pri ofte nekonataj kvalitoj de akvo.



Pastro Nogueira Machado prelegas pri la evoluo de la homo tra la jarcentoj.



sukcesis ekregi la naturon kaj la aliajn vivantajn estaĵojn helpe de la iloj, kiujn li metis inter si kaj la prilaborata materio.

Poste venis la paro scienca homo kaj teknologia homo, kiu fariĝis pli distanca de la naturo eĉ ne rekte tuŝante la ilojn. Kaj nun ekestas la kibernetika homo, kies maŝinoj eĉ povas decidi por li, kaj kies armiloj eĉ povas serĉi la homojn ĉie ajn sen iu ajn prizorgo de la amasmurdanto. Nun oni sentas la neceson, ke la homo realproksimiĝu al la naturo, refariĝu saĝa. Vere ĉi tiu prelego estas ne-resumebla. Ĝi estis interesa en ĉiuj detaloj. La aŭtoro eĉ montris, ke Esperanto estas tre taŭga kiel ponto inter la kibernetika homo kaj la resaĝiĝanta homo, pro siaj specialaj kvalitoj, kiel artefarita majstroverko, kiu neniam ĉesis esti natura.

Nia urugvaja samideano Barrocas sukcesis fari tre interesajn eksperimentojn kaj montri pri la akvo, kiun ni supozas koni, multe da faktoj, kiujn ni ankoraŭ ne konis. Inter ili la kondiĉojn, sub kiuj akvo bolas kiam oni MALvarmigas ĝin.

Sangiorgi montris, kiel la kibernetika pedagogio helpas la plibonigon de la instruaj programoj de l'Eduka Televido en São

Paulo. Post la teoria parto li montris, kiel ekzemplon, programon por la instruo de matematiko al liceanoj.

Ne estas spaco por paroli pri ĉiuj prelegantoj en Marilja. Do atendu la kompletan eldonon de la prelegoj, kiujn K.K.E. promesas por baldaŭa estonteco. Legu, ilin, lernu kaj ĝuu!

Katolika Diservo

Sanktan Meson en Esperanto celebris Pastro Nogueira Machado en la Ĉefpreĝejo São Bento, helpe de Pastro Roque dos Santos. La prediko temis pri ekumenismo.

ORDINARA ĜENERALA KUNSIDO de Brazila Esperanto-Ligo okazos la 14-an de oktobro. Speciala kulturprogramo estos prezentata ek de vendrede la 13-an vespere ĝis dimanĉe la 15-an matene. Ĉiuj anoĵ kaj amikoj de nia movado estas kore invititaj.



Solena malfermo en la salonego de Marilja Tenis-Klubo.

Unua Latin-Amerika Esperanto-Kongreso - sukcesa okazaĵo !

La brazilaj organizoj kunlaboris. UEA kaj la latin-amerikaj movadoj helpis kaj partoprenis. Wilson Martins organizis kaj prezidis. Amarílio Carvalho reĝisoris. Kaj la Unua Latin-Amerika Esperanto-Kongreso okazinta en la brazila urbo Marilja (17/22 julio) estis vera sukceso.

Ĝi ne estis perfekte glata kaj laŭplana evento, ĉar tiaj eventoj tre malofte okazas en la Tria Mondo. Tial estis malakurateco kaj diversaj teknikaj mankoj. Tamen la rezulto estis SUKCESO, kaj tio estas la grava punkto. Enskribiĝis 419 partoprenantoj el 11 landoj. Du urbestroj kaj pluraj aliaj politikistoj ne nur apogis, sed ankaŭ partoprenis plurajn partojn de la programo. La urbestro de Marilja, d-ro Theobaldo de O. Lyrio, estis honora prezidanto de la I LAEK. La urbestro de Bauru', d-ro Osvaldo Sbeghen,

gastigis la kongresanojn en postkongresa vizito. Kaj ambaŭ legis salutvortojn en perfekta Esperanto.

Estis scienco kaj arto; amuzo kaj laborkunvenoj; katolika Diservo kaj spiritisma renkontiĝo; alparolo de veteranoj kaj partopreno de gejunuloj; prezentadoj de temoj faritaj kaj de brazilanoj kaj de eksterlandanoj. Estis ŝakludado, kanzonfestivalo, sciencaj eksperimentoj sur podio, teatroludado, filmprezentado kaj ĉiam kaj ĉie vasta uzado de la internacia lingvo. Oni lanĉis la libron **Esperanto en Antaŭjuĝoj** de Walter Francini. Aperis la unua foto-romano en Esperanto, **Enuo**, direktita de Lima Cipolatti. UEA profitis la okazon por kunvenigi la estrojn de la latin-amerikaj landaj organizoj por pritrakti la plifortigon de la landaj movadoj kaj la plivastigon de la anaro. Kaj la tri prezidantoj de la brazilaj landaj asocioj subskribis kune leteron pri kunlaboro. Oni pristudos la eblecon havi la duan LAEK en Argentino, en 1980.

Ni esperas, ke ĝi estu tiel sukcesa kiel la unua.

Junulara partopreno

Junaj vizaĝoj estis videblaj ĉie en la 1^a LAEK. Ili venis el ĉiuj partoj de la lando kaj kelkaj el eksterlando. Ilia kontribuo al la sukceso de la kongreso estis aparte rimarkinda. Kadre de la programo okazis la 11^a

MUZIK-FESTIVALO DE BEJO, kiu ripetis la sukceson de la unua, pasintjare en Santos. Plurnacia juĝantaro decidis jene pri la 6 konkursantaj kanzonoj: la unuan kaj duan premiojn gajnis Francisco das Chagas, el São Paulo, pro siaj kanzonoj "Komparante" kaj "Pensu"; la tria premio estis aljuĝita al "La Kora Kanto", de Vicente Caetano (Goiás) kaj Adail Sobral (Bahia).

Menciindas ankaŭ la altnivelaj ludadoj de la pianisto André Luiz (Rio de Janeiro) kaj de la flutisto Kim Ribeiro (Minas Gerais).

La duan Konkurson Fraŭlino-BEJO gajnis Heliana Lúcia Corrêa, el São Paulo, kiu ankaŭ aktivis plurkampe: ŝi kantis kaj dancis



Francisco das Chagas — unua kaj dua premioj — kantis kaj ludis akompanata de Kim Ribeiro.

dum la Arta Horo, kaj tradukis Esperanten la prelegon de Prof-ro Sangiorgi pri kibernetiko.

Dum la Arta Horo kantis ankaŭ Sally Brabenec, el Britio, kaj la Muzika Ensemblo de Marilja.

Projekciado de lumbildoj pri la pasintjara Internacia Junulara Kongreso, en Francio, estis aranĝita de Alan Romero, komitatano de TEJO por Brazilo.

Eksterprograme okazis pluraj kunsidoj de la BEJO-Estraro. Oni diskutis la jenajn temojn, kiuj havis la ĝeneralan aprobon: statutsanĝoj por pli demokrata strukturo de BEJO; revivigo de la junulara revuo IMPULSO; programo de la dua Junulara Esperantista Renkontiĝo de Brazilo, okazonta en Goiânia venontjanuare; invito al la Internacia Junulara Kongreso de TEJO, ke ĝi okazu en Brazilo en 1981.

Paralele al aliaj kongresaj eroj okazis ankaŭ ŝaka konkurso kaj futbalmatĉo.



Heliana dancas por la plezuro de niaj okuloj... kaj por la dua sinsekva jaro ŝi estas premiita kiel Fraŭlino-BEJO.

Partoprenantoj en la muzikfestivalo. De maldekstre: Vicente Caetano, Francisco das Chagas, Kim Ribeiro, Adail Sobral, André Luiz Fausto, Alexandre Fausto.



Teatro kaj aŭdvidaj komunikiloj

Malgraŭ la manko de BRATEG, ne mankis teatro, kantado kaj arto ĝenerale en la Unua LAEK. La fama loka ensemblo Jarasus' ludis por la kongresa balo kaj kantis kaj portugale kaj esperante. La Arta Muzika Esperanto-Grupo de Marilja gajigis la merkredan vesperon ankaŭ per kanzonoj en tiuj du lingvoj. La fratinoj Solis el Argentino, gesinjoroj Mättig el Ĉilio kaj pluraj aliaj donis la tutamerikan tonon al la kongresa kantado. Ĉio estis agrabla kaj altvalora.

Oni vidis 16-milimetran dokumentan sonfilmon en Esperanto faritan de Sylla Chaves en Kalifornio. Estis du nacilingvaj filmoj pri brazilaj indiĝenoj. Kaj estis multe da lumbildoj kun esperantaj prezentoj. Lima Cipolatti kaj Álvaro Fausto ludis ENUOn, laŭ aranĝo de LAB-C-CIP. Tuj poste la sama teatraĵeto estis montrata per lumbildoj kaj sonbendo (produktitaj de Lima Cipolatti por B.E.L.), dum en la budoj de B.E.L. kaj K.K.E. oni disvendis la

foto-rakonton ENUO en kun-eldono de tiuj du organizoj. Tiu triobla prezento de la sama temo taŭgis por la klarigo de la nuna aglinio de B.E.L. fare de nia prezidanto: "Komunikaj formoj povas esti elitaj kaj amasaj; efemeraj kaj longedaŭraj; multekostaj kaj malmultekostaj. La antaŭenpuŝo de nia lingvo bezonas amasajn, longedaŭrajn kaj malmultekostajn formojn de komuniko. Poezio nuntempe estas elita komuniko, sed Esperanto havas multege da poeziaj libroj. Sonbendoj, bildlibroj, filmoj kaj diskoj, kontraŭe, estas amasaj komunikiloj, kaj nia movado bezonas ilin. Kelkaj komunikaj formoj, kiel la teatro, estas efemeraj. Aliaj, kiel la filmo, estas longedaŭraj. Teatro kaj filmo bezonas pli-malpli la saman talenton. Tial ni devas bedaŭri, ke la ekzistanta drama talento de la nunaj esperantistoj perdiĝas en efemera ludado, same kiel okazis en la pasinteco. Krome, por ni esperantistoj, la problemo de kostoj estas gravega. Ni kaj la eŭropanoj bone scias, kiel malfacila estis la farado de la tre malmultaj kaj ne sufiĉe bonaj filmoj ekzistantaj en Esperanto. Do mi estas tre kontenta kunpioniri tiun ĉi novan komunikilon por la Esperanto-movado. En la sama tempo, per unu sola tago de ludado, ni preparas foto-rakonton kaj projekcieblan sonbildan rakonton. Ambaŭ tiuj formoj de komunikado vekos la atenton de nia junularo kaj plivigligos la vivon de la kluboj de nia vasta internlando. Nia movado fariĝu pli alloga al la amasoj! Fotistoj, artistoj kaj verkistoj, kuniĝu al ni! Kune kaj antaŭen!"



Ludado de ENUO:
Lima Cipolatti kaj Álvaro Fausto.

UNUIĜO ESTAS FORTO

Via partopreno en la agado de B.E.L. estas necesa por la fina venko de Esperanto en nia lando.

Ni kantis en Marilja


La partoprenantoj en la unua LAEK multe kantis en Esperanto. El pluraj urboj kaj el pluraj organizoj venis kaj originalaj kaj tradukitaj kanzonoj por la ĝenerala amuzo. Elsa kaj Marta Solis, el Argentino, la Arta Esperanto-Grupo el Marilja kaj multaj aliaj gaje kantis kaj en la programo kaj eksterprograme. Estis kantado eĉ en la aŭtobusoj kaj en la koridoroj. Jen ĉi-sube du ekzempleroj de la tieaj kantaĵoj: LA GRAMATIKO, muziko de Domingo Federico kaj paroloj originalaj de Enrique Kohei, el Argentino; kaj TUJ, TUJ! (Cai, cai!), muziko kaj paroloj de Roberto Martins, esperantigitaj de Sylla Chaves.

LA GRAMATIKO

Esperanto estas la sola lingvo, kies tuta gramatiko enteriĝas en unu kanzono.

Rekantaĵo:

*La gramatiko en Esperanto
facila estas, ni lernas ĝin:
per simpla aldono al la radiko
de la finaĵo, ni konas ĝin*



1)
*La substantivo finiĝas per "o",
la adjektivo finiĝas per "a",
devena adverbo finiĝas per "e"
kaj artikolo estas nur "la".*

2)
*Verboj nuntempaj finiĝas per "as",
pasinta tempo finiĝas per "is",
venonta tempo finiĝas per "os"
kaj la pluralo estas kun "j".*


3)
*Ordonas modo finiĝas per "u"
kondiĉa modo finiĝas per "us",
kaj sendifina finiĝas per "i"...
kaj la pronomo estas kun ĝi.*

4)
*Komencas ni la demandojn per "ĉu",
akuzativo solviĝas per "n",
afiksoj helpas al vortoproviz;
kaj gramatikon konas jam ni.*

TUJ, TUJ!

Rekantaĵo:

*Tuj, tuj, tuj, tuj!
Falu, falu, falu tuj!
Tuj, tuj, tuj, tuj!
Estis ŝel' sub bananuj'!*



1)
*Multaj falas pro deziro.
Falas multaj pro dolor'.
Kiel pluvo, resopiro
lante falas en la kor'.*

2)
*Falis sur mian rigardon
via ĉarma okulbrun'.
Koro ŝetis fajran ardon,
kaj la cindroj falas nun.*